

Disvastiĝi kaj kanti

Ralph A. LEWIN

Ni ĝeneraligu! Bestoj kaj plantoj estas diploidaj, sed la seksĉeloj estas haploidaj. Ili ĉiuj devas disvastiĝi. Viraj seksĉeloj kaj iaj planktaj larvoj povas moviĝi per flageloj aŭ cilioj, sed pli grandaj bestoj – medusoj kaj aliaj estaĵoj – uzas muskolojn. En maroj aŭ lagoj, la plej multaj bestoj povas naĝi, kaj surtere, aere, bestoj povas disvastiĝi per rampi, kuri, eĉ flugi. Kontraŭe, plantoj ne povas tiel moviĝi, ili disvastiĝas kiel semoj. La virseksaj ĉeloj de muskoj kaj filikoj disvastiĝas tra akvo, sed pli evoluiĝintaj plantoj disigas ilin tra aere kiel poleneroj.

Koniferoj kiel pinoarboj “spekulacias” laŭ hazardo de ventoj: el bilionoj da poleneroj eble unu estos hazarde blovita ĝis renkonti kaj fekundigi ovon, por fine kreskiĝi novan pinon. Dum la kretaceo, florplantoj evoluis pli ekonomian sistemon: persvadi flug-povajn insektojn akcepti la “portan taskon” – allogi ilin per reklamado, per belaj floroj, belaj koloroj, plaĉaodoro kaj pagi la vojaĝkoston per guto da mielo. Tiel la plantoj nedirekte uzas lumenerĝion kaj ĥemion.

Sed, kontraŭ la aserto de poetoj, floroj neniel kantas kiel birdoj. Por vibrigi aeron necesas muskoloj, malhavataj ĉe floroj. Plantaj ĉeloj tro malrapide kreskas eĉ por ĉirpi. Ĉu ekzistas iu alia elpensebla eblo per kiu floroj povus eligi allogajn sonojn, eble per uzo de aliula energio? Tipan susuron aŭ fajfeton eble – sed tio aŭdiĝus nur proksime, kaj tute ne funkcius sen vento. Ĉu lumenerĝio falanta sur petalojn povus fluoreski kiel vibrado? Laŭ miaj amikoj fikistaj, neeble. (Ĉu vi povus elpensi alternativon? Mi, ne!). Tial floroj ne kantas...

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. Ralph A. Lewin
University of California, 3110, Hubbs Hall
La Jolla, CA 92093-0202 / USONO

<rlwin@ucsd.edu>

Priaŭtoro informo

La aŭtoro estas emerita profesoro pri mara biologio de *Scripps Institute of Oceanography*, Univ. of California, 9500 Gilman Drive, La Jolla, CA, USA.

Ĉu turkoj povas lerni Esperanton?

Gerald TUCKER

Enkonduko

Kiam esperantistoj klopodas konvinki iun edukministerion ke ĝi enkonduku Esperanton en la lernejon, ili devas kalkuli pri strangaj kontraŭargumentoj. Tiel okazis kiam reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj lernejoj vizitis la bavaran edukministerion. Unue ili renkontis ne la ministerion mem (latiniston) sed ties anstataŭanton (juriston), kiu tuj konfesis nenion scii pri la koncerna temo. Lin akompanis oficisto el la gimnazia kariervojo, kiu post kelkaj monatoj sendis respondon kun ripeto de la dum jardekoj prezentataj kaj bone konataj kontraŭargumentoj kaj kun kurioza nova tezo: “Esperanto ne estas internacia en la senco, ke ĝi povus esti facile lernata de ĉiu ajn lingvano”. Kiel ekzemplon li nomis la turkojn, kies tipologie aglutina lingvo apartenas al la tjurka lingvofamilio. Sekvis ekspertizo, kies elementoj evidente estas ĉerpitaj ne laŭ turka sed laŭ eŭroplinga vidpunktoj kaj parte parolas pli elokvente por ol kontraŭ Esperanto.

Prijuĝante la relativan lern-facilecon de fremda lingvo necesas konstati, **kiuj elementoj de la cel-lingvo helpas aŭ malhelpas al la lernanto**. Principe lingvo prezentas por lernanto du parametrarojn: la **leksikon** (vortrezoron) kaj la **lingvosistemon** (strukturen, ankaŭ nomata gramatiko). Kvankam ekzistas lingvoj, ĉe kiuj tia divido ne eblas – tamen Esperanto, la turka kaj la hindeŭropaj etnolingvoj estas tiel karakterizeblaj. La tjurka kaj la finn-ugra lingvofamilioj apartenas morfologie al la aglutina lingvotipo. Esperanto estas laŭderive hindeŭropa lingvo kun fleksia/aglutina-morfologia lingvosistemo.

Sur la sekvontaj paĝoj mi klopodas prezenti Esperanton laŭ la vidpunkto de turklingvano kaj samtempe de aliaj membroj de ne-hindeŭropaj lingvoj.

La sola germana edukministerio, kiu vere lingve okupiĝis pri Esperanto, estas la bavara. Tio okazis en la jaro 1988 post vizito de grupo de instruistoj el ĉiu en Bavario reprezentata lerneja speco. La respon-